7 Post la fino de BEKKVAR nun eblas al ŝi legi iomete la revuojn kaj aliajn periodaĵojn de Esperanto kiel *Monaton, Kontakton, Eventojn*, kaj *Heroldon de Esperanto*. (ebl)

⇒ (ig)

8 Nuntempe en oficejoj kaj laborejoj ĉie, oni uzas komputilojn kaj aliajn elektronikajn maŝinojn anstataŭ la skribmaŝinoj kaj aliaj malmodernaj iloj. (anstataŭ)

⇒ (ig)

⇒ (iĝ)

9 Sinjoro Rodrigo veturis tiun matenon al la laborejo per metroo. Poŝoŝtelisto alproksimiĝis al li, kaj poste malproksimiĝis de li. Poste li estis sen biletujo! (sen)

⇒ (ig)

10 Estis matene, kaj du vakeroj rajdis ĉevale sur la vasta ebenaĵo de Teksaso, la granda ŝtato de Usono. Unu vakero diris al la alia: "Rigardu! Niaj bovoj estas dise! Ili estas ĉie! Ne devas esti! Ili devas esti nur are, grupe! (ar)

⇒ (ig)

⇒ (iĝ)

11 La konsilio (konsilantaro) de la granda entrepreno ne estis kontenta pri la financaj rezultoj de la prezidanto, ĉar li elspezis tro, kaj li enspezis ne sufiĉe. (eks)

⇒ (ig)

12 La reĝo abdikis pro amo al bela virino kiu ne estis kortegano, do nun li ne plu estas reĝo. (eks)

⇒ (iĝ)

13 La kato estis en la domo. La patro vidis ĝin. Poste la kato estis ekster la domo. (ekster)

⇒ (ig)
⇒ (iĝ)